UK en Torino 01/08/2023

# “NI REPRENU PEDAGOGION”

"De la Pedagogio ĝis la NeŭroPedagogio
tra etim-epistemologia kritiko al la sciencoj de la psiko
dank’al...

...ALIANCO inter
PEDAGOGIO kaj
NEŬROLOGIO .
Estas nova scienco
kiun mi difinis kiel
“NEŬROPEDAGOGIO”




UK en Torino 01/08/2023

# “Kiu kaj kio mi estas?”

Mi diplomiĝis pri biologiaj sciencoj kaj specialiĝis pri subteno al tieldiritaj, “alimanier-kapabloj” (pasintece, *“handikapuloj”),* en mezlernejo. Mi instruis ankaŭ ĉe la Universitato de Modeno pri bio-pedagogiaj strategioj de lernado por helpi kiujn havas alian manieron por enmenigi, (“enkapiĝi”) la informojn kaj la stimulojn devenantaj el la ekstera mondo. Pro tio mi lernis kaj trejniĝis pri neŭropedagogio en Parizo, kaj partoprenis, dum pli ol tridek jaroj, la asembleojn de “Popola Terapia Agado” fare de Antonietta Bernardoni por la reciproka kaj daŭra edukado kaj por la “resanigo” de tieldiritaj “mensmalsanuloj” - per sociaj iloj, (t.e. reciproka helpo, solidareco, konkreta analizo de *povo-rilatoj inter la homoj,* kaj konkretaj transformoj de konkretaj situacioj...)



Memoroj estas konstruitaj kun la nivelpasejo de la percepto al la elvoko je mensa nivelo



# Kio estas pedagogio?

*“La lukto kiun, de naskiĝo, ĉiu infano devas fari, kun la helpo de samaĝuloj kaj plenkreskuloj, por sukcesi – pere de saĝa uzo de tempo, konsiderata kiel 'spaco de homa disvolviĝo"- iĝi homo kapabla... en dialektika rilato kun la obstakloj kaj instigoj, kiujn la ĉirkaŭa socio laŭgrade estos prezentanta al li,* ***havas la nomon de pedagogio.”***

(A. Bernardoni La ĉiutaga vivo kiel historio)







# Kiam nakiĝis la pedagogio?




La pedagogiaj sciencoj naskiĝis kune kun la homaro mem, ĉar la homa specio diferenciĝas de la animalaj specioj pro la fakto ke ĝi devas eduki dum longa tempo siajn idojn.



**“Grandega estas la bezono de lernado kaj edukado de ĉiu membro de nia specio...”**






Dum miloj da jaroj fakte migrantaj birdoj transiras malfermitajn spacojn sekvante trajektoriojn perfektajn kiujn ili ne bezonas lerni ĉar la itinero, estas priskribita - en la genetika heredaĵo de tiu specio.

Sed la homido devas lerni ĉion:

*[...] ĉe naskiĝo ĝi posedas nur kelkajn refleksojn, kiel la reflekson de suĉado. Pro tio, la ido de la homa specio devas labori multe antaŭ ol konkeri tiun parton de la homa heredaĵo kiu vere transformus lin en homon, komencante ekde la kapablo piediri uzante nur la subajn membrojn* [...]







*[...] ĝis uzi organizitan paroladon, esprimon de penso pli aŭ malpli matura, kiu poste povos esti tradukita al signoj de skribado [...]*



# “...ne agresemo... estas nur esploremo...”

***“La infano naskiĝas ankaŭ kun la nekondiĉita reflekso de orientiĝo kaj esplorado.*** *Alivorte, kun la bezono esplori la mondon, tuŝi ĝin konkrete, transformi ĝin por ĝin koni: tio, kio povas ŝajni foje agresemo estas nur esploremo, tio kio ŝajnas perforto, estas nur nesperta maniero demandi al homoj, aferoj, bestoj kaj postuli respondojn: “kiu vi estas vere? kiel vi estas farita? kio estas en vi? kion vi kaŝas al mi? kiaj estas la rilatoj, kiuj povas esti starigataj inter ni?”*

( *A. Bernardoni “La* ĉiutaga vivo kiel historio...”)





*“...kio povas ŝajni foje agresemo estas nur esploremo...”*

# "Tro da psikologio en la ĉiutaga vivo". (Frank Furedi)

Sed hodiaŭ pedagogio, en Italio, preskaŭ ne ekzistas... anstataŭita de la psikologio kaj ĝia suspekt-kulturo de perturboj tial la homoj devenas etikedojn (psikologjo, ekzemple, parolas per etiked-akronimoj ADHD, DSA... kiuj estas etikedoj de tieldiritaj perturboj de hiperktiveco kaj atento deficito,...disleksio, disgrafio... en la lernado kaj en ĉiuj aspektoj kaj emociojn de ĉiutaga vivo.



**Pri tiu-ĉi medikalig-kulturo je suspekto de perturboj donas al ni -taugan ekzemplon per rakonteto - la fama itala pedagogo G. Rodari**



**La nigra suno**

Mia knabineto desegnis karbonigran sunon
Nur ĉirkaŭita de kelkaj oranĝaj radioj.
Mi montris la desegnon al kuracisto.
Li balancis la kapon, kaj diris:
"La kompatind-ulino, mi suspektas, estas turmentata pro malĝoja penso, kiu igas ŝin vidi ĉion nigra. En la plej bona kazo ĝi estas vidmanko: portu ŝin al okulkuracisto”.
Tion diris la kuracisto kaj mi estis mortanta pro timo.
Sed, tiam rigardante plej bone la suban parton de la desegno, mi vidis, ke tie estis skribita, en malgrandaj literoj: **"la eklipso".**


(Gianni Rodari)

# Cŭ vere oni volas trasformi lernejon en malsanulejon?

Kio okazas en la lernejo pro manko de pedagogia aliro, anstataŭita de la psikologio kiu, per kuracigan kaj psikologigan agadon, transformas en malsanon, kion estas nur edukaj kaj kreskaj bezonoj de infanoj, kiuj ankoraŭ ne estas kontentigitaj?




Skribas Antonietta Bernardoni pri tiu ĉi temo en sia libreto "La psikiatrio kontraŭ la lernejo":




"La ekzisto de lerneja psikologo, deprenante de la instruisto la respondecon, kreas sentojn de nekapableco en la plej lertaj instruistoj kiuj vere volas helpi la "malfacilan" infanon, sed ili pensas ke, ĉar ili estas senigitaj de la 'fundamentaj' psikologiaj scioj, ili ne estas kapablaj fari tion.

# KIO ESTAS NEŬROPEDAGOGIO?

Laŭ wikipedia voĉo, de mi mem farita, el la libro:
(“Ni reprenu la pedagogion” Ermanno Tarracchini, 2015)




*“Neŭropedagogio estas nova scienco pri lernado, edukado kaj formado de la personeco bazita sur la dialektiko inter biologiaj kaj sociaj aspektoj. Scienco kiu integras la biologian aspekton de la neŭrologio kaj la sociedukan aspekton de la pedagogio, je la lumo de historiaj, valoraj, filozofiaj, moralaj kaj spiritaj procezoj.* Scienco, kiu ne restas neŭtrala - sed flanke de la prematoj *konsideras ankaŭ la efikojn de povo-rilatoj kaj ekspluatado sur la homo fare de la homo.”*

(Riprendiamoci la Pedagogia” E.Tarracchini, 2015)

# De kio kaj de kiu devenas la NeŭroPedagogio?

NeŭroPedagogia aliro komenciĝis, laŭ miaj esploroj kaj studoj, kun la eksperimentoj de Pavlov, pri kondiĉitaj kaj malkondiĉitaj refleksoj. (Refleksologio scienco estas klara ekzemplo pri la influo de la dialektiko inter biologaj kaj sociaj aspektoj en la formado de homa sinteno)

Refleksologio, fakte, estas la scienco kiu okupiĝas pri kondiĉadoj kaj malkondiĉadoj procezoj en edukado. Alja granda kontribuo venis de la antropologia scienca pedagogio de Maria Montessori pere de konceptoj kiel "la mano estas la organo de la inteligenteco" kaj tiu de "absorba menso".

# Kion celas NeŭroPedagogio?

La NeŭroPedagogio naskiĝis, laŭ mia kono kaj miaj lernejaj spertoj kun "alimanier-kapablaj" lernantoj, kiel pedagogia alternativo al la "sciencoj" de la psiko, vidante iliajn malsukcesojn kaj malkapablon helpi ilin, ĉar kiel **A.Bernardoni**, **afermis:**
***"La sekreto de homaj faktoj apartenas al la scienco de la historio"*** je la lumo de la dialektiko inter biologiaj kaj sociaj aspektoj de la formado de la homa menso kaj personeco.

Pri tio, A.Bernardoni afermis ke **[...]** ***nek psikologio, nek psikiatrio, nek psikanalizo, iel tenas la sekreton de homaj faktoj pro la simpla kialo ke tia sekreto ne estas de psikologia, psikiatria, aŭ psikanaliza naturo, sed ĝi povas esti malkaŝita nur per la scienco de la historio*** **[...]**

# Kio estas la scienca pedagogio de Maria Montessori?

*...krome M.Montessori* okaze de *la pedagogia kongreso de Torino en 1898 substrekas la bezono de pedagogio, anta*ŭ ĉio*, en la lernejo* ..."



*"...Scienco procedas per observado, sed observado ne devas fariĝi rezignacio, neniu infano, eĉ se klasita kiel malsana aŭ* tardulo, *povas esti ekskludita de la scienco kiu koncernas lin, la Pedagogio".*

# Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni: du gravaj sciencistinoj kiuj interkonatiĝis kaj antauenigis neuropedagogion

Kiel Maria Montessori, Antonietta Bernardoni estis kuracistino kaj pedagog-sciencistino, kaj dediĉis sian vivon al la kresko kaj al la ŝanĝo de la homa personeco por akiri mensan kaj socian bonfarton.

**Aktualeco kaj estonteco de " Antropo-evolua mal-alienado " fare de Antonietta Bernardoni.**




*"Antropevolua mal-alienigo konsistigas la sintezon de preskaŭ kvardek-jara esplorado ankoraŭ daŭranta (1987) bazita unuflanke sur la observado - en la faktoj - de la plastikeco de la cerbo kaj aliflanke sur konkreta transformo de konkretaj situacioj per la starigo de interhelpaj grupoj por la formado de personeco per la engaĝiĝo de ĉiuj."*

## Resume: La Neŭropedagogia aliro kontraŭ la medikaligon de edukaj problemoj

*"Forpreni respondecon kaj medikaligi estas plej komforte, per: diagnozo, receptoj, drogoj, psikologo kaj la knabo fragmentiĝis inter diversaj fakuloj.* (Grazia Honegger Fresco)

# “Homo estas, samtempe, biologia objekto kaj historia subjekto.”

En la libro “La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj sen psikiatrio”, tra antropologio, historio, socio kaj neurologio Antonietta Bernardoni skribis:
**"Homo estas, samtempe, biologia objekto kaj historia subjekto.**

**La vivo de la individuo ne nur havas personan kaj familian signifon sed neeviteble fluas en la grandan riveron de la historio. Ni ĉiuj konstruas historion: neniu el ni iam estas neŭtrala.”**



# Mi finigas mian prelegon per du gravaj pripensoj.




- Ĉu la pedagogiaj sciencoj vere devos esti anstataŭitaj de psikiatrio, psikologio kaj psikanalizo?

- Ĉu la psikiatro kaj la psikologo estas senespere destinitaj fariĝi "la instruistoj de instruistoj"?

Jen la libroj kiujn vi povas trovi ĉe la libroservo: la esperantan version de la libro de Antonietta Bernardoni kaj mian libron nur en la itala. Nia celo estas diskonigi neuropedagogiajn konceptojn kaj proponojn precipe de A. Bernardoni kaj igi la homaron akiri specian konscion, do mi esperas ke iu esperantisto tra la mondo pretas traduki al sian propran nacian linguon "La ĉiutaga vivo kiel historio" kiu estas disponebla papere ĉe la libroservo kaj ankaŭ elŝutebla ĉe ILEI [https://www.ilei.info/agado/chiutaga_vivo.pdf](https://www.ilei.info/agado/chiutaga_vivo.pdf)







Dankon pro via partopreno kaj atento!